

Heinrich Heine,
La Sileziaj teksistoj

tradukita de Manfredo Ratislavo

Ĉe siaj teksiloj la dentojn grincante
Sidadas teksistoj jen, ne plorante:
Ni teksas trioblan malbenon por vi
En vian morttukon, Malnov-Germani'.
Ni teksas, ni teksas!

Malbenon al Dio, al kiu pro nia
Mizero ni preĝis en kredo pia;
Ja vane esperis, atendis ni,
Nin mistifikis kaj trompis Li.
Ni teksas, ni teksas.

Malbenon al tiu ĉi reĝ' de l' riĉuloj,
Kiu ne kompatis je ni mizeruloj,
Ĉantaĝas la lastajn groŝojn el ni,
Kiel hundojn nin pafmortigigas li.
Ni teksas, ni teksas.

Malbenon al tiu ĉi falsa patrio,
Kie nur prosperas la koterio,
Kie estas rompata ĉiu juna flor',³
Kie regas de l' putro la odor' -
Ni teksas, ni teksas!

Navedo flugas kaj krakas teksil',
Ni teksas senlace dum nokta trankvil' -
Morttukon ni teksas, Germanujo, por vi,⁴
Enteksas trioblan malbenon ni,
Ni teksas, ni teksas.

...

Heinrich Heine,
La ruĝaj teksistoj

tradukita de Emil Pfeffer

En senlarma okul' kaŝante la sentojn,
Ili sidas kaj teksas kaj grincas la dentojn:
Malnova mond'! Ni teksas en pen'
Morttukon al vi kun triobla malben' -
Ni teksas, ni teksas!

Malben' al diaĵo, al kiu kun preĝo
Turniĝis en frosto, malsato kaj neĝo
Ni kaj atendadis en vana esper' ...
Ĝi mokis kaj ridis je nia mizer' -
Ni teksas, ni teksas!

Malben' al la reĝo, la reĝo de riĉaj,
Senkora vampiro por ni malfeliĉaj,
Senigis li nin de la lasta mon',
Nun oni nin pafas laŭ lia ordon' -
Ni teksas, ni teksas!

Malben' al falsa la patrolando,
Kie regas tiaj vampiroj en bando,
Elsuĉas vivsukojn el ĉiu jun-flor',
Protekt' nur por vermoj, putraj', malhonor' -
Ni teksas, ni teksas!

Kaj krakas teksilo kaj flugas ŝipet',
Ni teksas sen ĉes', kun la mort' pro l' vet' ...
Malnova mond'! Ni teksas en pen'
Morttukon al vi kun triobla malben' -
Ni teksas, ni teksas!

...

³Kie frue rompatas ĉiu flor',

⁴Morttukon, ni teksas por vi, Germani',
Trioblan malbenon enteksas ni.

*Traduko de la Germana poemo “Die schlesischen Weber” de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 2004-05-31.*

MR-347-2-1 / Arg-240-489 (2004-06-02 11:46:37)

Esperantigo laŭ la dua germanalingva teksto, kiu estis – kun la rimarkigo “de la poeto reviziita” – eldonita en 1846 de H. Püttmann en la volumo “Album. Originalpoesien” (= “Albumo. Originaj poeziaĵoj”). [Laŭ interreta informo de l’ 27.05.2004 de la Instituto Heinrich Heine, Düsseldorf, s-ino Marianne Tilch.]

*Traduko de la Germana poemo “Die schlesischen Weber” de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de EMIL PFEFFER (*1891-12-16 – †1965-11-20) en 1929.*

Arg-240-481 (2004-05-24 22:44:39)

La traduko de Emil Pfeffer aperis en la sveda revuo “Svenska Arbetar-Esperantisten” (= “La sveda laborista Esperantisto”, en la septembra-oktobra numero de 1929, sur paĝo 83. Mi, Manfred Retzlaff, trovis tiujn informojn kaj la tradukon de Emil Pfeffer en la libro “Verkoj de Heinrich Heine” de Adolf Holzhaus, eldonita en 1973 de la “Esperanto-Ligo en Israelo”.